

**Ho, mia kor'** de L. L. Zamenhof

*Ho, mia kor', ne batu maltrankvile,  
El mia brusto nun ne saltu for!  
Jam teni min ne povas mi facile,  
Ho, mia kor'!  
Ho, mia kor'! Post longa laborado  
Ĉu mi ne venkos en decida hor'?  
Sufiĉe! trankviliĝu de l' batado,  
Ho, mia kor'!*

Kraťoučká báseň od Ludvíka Zamenhova z roku 1887 obecně brána jako první literární text publikovaný v esperantu. Na internetu často ve zhudebněné verzi, <https://www.youtube.com/watch?v=gGz1KWNCsmk>.

**La Espero**

*En la mondon venis nova sento,  
tra la mondo iras forta voko;  
per flugiloj de facila vento  
nun de loko flugu ĝi al loko.*

*Ne al glavo sangon soifanta  
ĝi la homan tiras familion:  
al la mond' eterne militanta  
ĝi promesas sanktan harmonion.*

*Sub la sankta signo de l' espero  
kolektiĝas pacaj batalantoj,  
kaj rapide kreskas la afero  
per laboro de la esperantoj.*

*Forte staras muroj de miljaroj  
inter la popoloj dividitaj;  
sed dissaltos la obstinaj baroj,  
per la sankta amo disbatitaj.*

*Sur neŭtrala lingva fundamento,  
komprenante unu la alian,  
la popoloj faros en konsento  
unu grandan rondon familian.*

*Nia diligenta kolegaro  
en laboro paca ne laciĝos,  
ĝis la bela sonĝo de l' homaro  
por eterna ben' efektiviĝos.*

**Oh, My Heart** by L. L. Zamenhof

*Oh, my heart, don't beat so uneasily,  
Do not leap from my chest now!  
I can barely hold myself now,  
Oh, my heart!  
Oh, my heart! After a long labor,  
Will I not win in the critical hour?  
Enough! ease your beating,  
Oh, my heart!*

**Naděje**

*Na svět přišel nový pocit,  
světem se šíří silný hlas;  
na křídlech lehkého vánku  
nechtě letí z místa na místo.*

*Netouží po meči zakrváceném,  
ale po utužování lidské rodiny:  
světu věčně válčícímu  
nabízí svatou harmonii.*

*Pod svatým znamením naděje  
shromažďují se za mír bojovníci,  
a rychle roste dílo  
lidí doufajících.*

*Silně stojí zdi tisíciletí  
mezi lidmi rozdělenými;  
však překážky vzdorné  
budou svatou láskou rozbity.*

*Na základě neutrálního jazyka  
rozumějící jeden druhému  
lidé utvoří ve shodě  
jeden velký kruh rodinný.*

*Naše pilné společenství  
se prací za mír neunaví,  
dokud se pěkný sen lidstva  
pro věčné požehnání nenaplní.*

**Naděje** taktéž od L. Zamenhova z roku 1890 dnes slouží jako neoficiální hymna esperantistů, zhudebněna např. [https://www.youtube.com/watch?v=d97KYGy0\\_NY](https://www.youtube.com/watch?v=d97KYGy0_NY).

**La lasta kiso** de E. Privat

*Vi kien flugas, papilio,  
tremante kaj rapide?  
Jam mortis rozo kaj lilio,  
kaj venas frost' perfide.*

*Flugiloj viaj kvazaŭ lampo  
briletas en nebulo:  
vi kion serĉas tra la kampo,  
perdita somerulo?*

*Dezertaj estas la ĝardenoj,  
tra kiuj vagis l' amo via.  
Skeletoj ŝajnas la verbenoj  
sub laŭbo senfolia.*

*Vi kial flugas en malvarmo  
tra flora la tombejo?  
Sur ĉiu loko pluva larmo  
nun restas en herbejo.*

*Silentas ĉiuj en la nestoj  
kaj svenis bonodoroj;  
plu ne batalos vi kun vespoj  
pri la floretaj koroj.*

*Jen restas nur en kampo vasta  
velkinta krizantemo,  
sur kiu kiso via lasta  
mortigos vin en tremo.*

**A Last Kiss** by E. Privat

*Where are you flitting, butterfly,  
trembling and quickly?  
The rose and the lily have already died,  
and the frost comes treacherously.*

*Your wings, as though a lamp,  
glimmer in the fog.  
Whom do you seek throughout the field,  
lost one from the summer?*

*The gardens are deserted,  
through which your love would roam.  
The verbenas seem like skeletons  
under an oak without leaves.*

*Why do you fly in the cold  
through the flower-filled graveyard?  
On every place a rainy tear  
now lies upon the grass.*

*All are silent in the nests,  
and the fragrances have fainted;  
you will now longer fight with evening  
over the hearts of the blossoms.*

*See—all that remain in the vast field  
are wilted chrysanthemums,  
on which your last kiss  
will kill you, shuddering.*

Báseň Edmonda Privata, švýcarského historika a esperantisty, z roku 1912. Opět lze najít i zhudebněno s mírně pozměněným textem <https://www.youtube.com/watch?v=nfeYWey-ius>.

Z méně „seriózního“ soudku je potom následující báseň Clarence Bicknella z roku 1904.

### **Mušofiŝobirdoratokathundo** de Klarenco Bicknell

Mi foje havis muŝon;  
Tre bona kaj tre saĝa  
Ĝi estis, kvankam juna,  
Nur unutagoaĝa.

Okazis ke en akvon  
Ĝi falis, je l'flugado,  
Kaj mia ora fiŝo  
Ĝin kaptis por manĝado.

Kaj tiam la naturo  
De mia fiŝ' ŝanĝiĝis;  
La muŝon englutinte,  
Ĝi muŝofiŝo iĝis.

Post tio mia birdo,  
Belega sed manĝema,  
La muŝofiŝon manĝis  
Sen penso kompatema.

Kaj mia kara birdo  
Post tia buŝotuŝo,  
Ne estis simpla birdo,  
Sed birdofiŝomuŝo.

La birdofiŝomuŝo  
Flugilojn siajn batis,  
Kaj tiam mia rato  
Ekvidis, kaj malsatis.

La gusto de l'flugiloj  
Tre plaĉis al palato;  
Kaj mia rato iĝis  
Muŝofiŝobirdorato.

Ho ve! ekzempl' malbona!  
La kato, al oranĝo  
Simile, tiam pensis  
Pri gusta vespermanĝo.

La raton tuj li kaptis,  
Kaj mi, de tiu dato,  
Deviĝis lin eknomi  
Muŝofiŝbirdorato.

Sed baldaŭ li mortiĝis,  
Ĉar mia hundo brava  
Ekdiris, post pripenso,  
"La kato estis prava."

Kaj tial, unu tagon,  
Li, per dentega vundo,  
Mortigis lin, kaj restis  
MUŜFIŜBIRDRAKATHUNDO.

Jak jsme si ukazovali na začátku semestru, do esperanta bylo také mnoho děl přeloženo. Níže příklady upravených Ezopových bajek (eo. *Ezopa saĝo*) z ruky významného maďarského esperantisty Kálmána Kalocsaye z roku 1956.

### **La lupo kaj la ŝafido**

*Riveron saman lupo kaj ŝafido sub  
la pelo de sojfo aliris, kaj la lup'  
pli supre staris, pli malsupre la ŝafid'.  
La lupo ataki kaŭzon serĉis kun avid':  
„He, kial mian akvon miksas vi kun ŝlim'?"  
„Kiel mi povus? — diris tiu kun ega tim' —  
De vi ja venas al mi la rivera flu'."  
Tro forta vero! Necesis kaŭzon serĉi plu.  
„Vi antaŭ duonjaro ĉikanis akre min!"  
„Ne naskis tiam min ankoraŭ la patrin'!"  
„Diablon! Via patro ĉikanis do sen dub'!"  
Kaj, senkulpulon, kaptis, manĝis ĝin la lup'.*

### **Flugemo**

*"Ho flugi, flugi! Kiel rave  
ja estus flugi flugilhave!"  
Tiel suspiris rampe-glita  
testudo en sopirflagro.  
Aŭdinte tion, per subita  
ekpren' ĝin levis aglo  
en la aeron supernuben,  
tie ĝin lasis fali suben.  
Okazis, ve, frakaso  
al membroj, al kiraso.  
Kaj la testudo ĝemis laste:  
"Ho, kial tiu do fantaste  
deziras flugi en aero,  
kiu nur pene rampas sur la tero!"*